



**LA MALGRANDA KATEKISMO
DE DOKTORO MARTIN LUTHER**

LA AŬGSBURGA KONFESIO



1961

**TRADUKITA DE RICHARD HOPPE
AUERBACH KREIS ANSBACH**

La Malgranda Katekismo
de Doktoro Martin Luther
kaj
La Aŭgsburga Konfeso

tradukita de
Richard Hoppe
Auerbach Krs. Ansbach

eldonita de Oekumenische Liga e. V., Delmenhorst
presita de Druck-Universal, Berlin SW 61

1 9 6 1

Antaŭparolo.

En la jaro 1932 pastoro Löwe el Radebeul eldonis libreton pri la vivo de D-ro Martin Luther kun aldono: "La Malgranda Katekismo". La stoko estas elĉerpita jam delonge. Certe nur kelkaj ekzempleroj ankoraŭ ekzistas. La sveda sekcio de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) petis min, reeldoni la Katekismon. Estis necese, tute denove traduki. Kiel bazon mi prenis la novan tekston, kiu estas aprobita de la Unuigita Evangelia Luterana Eklezio de Germanujo kaj de la Konsilantaro de la Evangelia Eklezio de la Unio en Germanujo. Al la Katekismo mi aldonis la Aŭgsburgan Konfesio, kiu estas la ĉefa konfesio de la Luterana Eklezio krom la tri ĝeneralaj konfesioj. Por la Aŭgsburga Konfesio mi prenis la mallongigitan kaj glatigitan tekston, kiun la Evangelia Luterana Eklezio en Bavarujo uzis kiel aldonon al la nova bavara kantaro.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj helpis atingi plejeble bonan rezulton, kiuj kun zorgema diligento legis mian provajon, denove komparis ĝin kun la biblia kaj latina tekstoj kaj serĉis kun mi la plej konvenajn tradukojn. Mi nomas Erich Quentin-Delmenhorst, la sekretarion de la germana sekcio de KELI, la pastorojn Adolf Burkhardt-Gechingen kaj Joachim Brink-

mann-Lengerich, kaj la alilandajn amikojn, kies kunlaboro estis al mi precipe grava: Karl Olof Sandgren-Östanjö, profesoro pastoro Downes M.A.B.D.-Bristol, de Hoog-Amsterdam, la prezidanto de KELI.

La Germana Nacia Komitato de la Luterana Mondligo donacis grandan monhelpon por la presado. Ankaŭ pro tio ni elkore dankas.

La kristana Esperanto-Movado estas ekumena movado, kaj ni kredas, ke la esperantistaj gefratoj ĝojos, ke ili havas pluan eblecon, konatiĝi kun la ĉefaj kredaj fundamentoj de la unuopaj eklezioj. Ankaŭ tiu libreto estu benata helpo por fruktodona ekumena laboro kaj por ĝojo de multaj kristanoj pri nia kredo al Jesuo Kristo, la Savanto de la mondo.

Aüerbach, en Januaro 1961
über (13a) Ansbach Mfr.

OEKUMENISCHE LIGA E. V.
Hoppe, Pastoro

La Dek Ordonoj

Mi estas la Eternulo, via Dio,

1. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.
2. Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.
3. Sanktigu la tagon sanktan.
4. Respektu vian patron kaj vian patrinojn; por ke estu al vi bone kaj longe daŭru via vivo sur la tero.
5. Ne mortigu.
6. Ne adultu.
7. Ne ŝtelu.
8. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.
9. Ne deziru la domon de via proksimulo.
10. Ne deziru la edzinojn de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al li.

La Kredo

Mi kredas je Dio la Patro,
la Ĉiopova, Kreinto de la ĉielo kaj de la tero.

Kaj je Jesuo Kristo,
la sola Filo de Dio kaj nia Sinjoro,
kiu enkarniĝis per la Sankta Spirito,
naskiĝis el la virgulino Maria,
sufervis sub Pontio Pilato,
krucumiĝis, mortis kaj entombiĝis,
malsupreniris en la inferon,
la trian tagon releviĝis el la mortintoj,
supreniris en la ĉielon,
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li revenos,
por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

Mi kredas je la Sankta Spirito,
unu sankta kristana Eklezio,
la interkunuleco de la sanktuloj,
pardono de la pekoj,
releviĝo de la karno,
kaj vivo eterna.

Amen.

La Patronia

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
Sanktigata estu Via nomo,
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la
tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni
pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton.
Sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar viaj estas la regno kaj la potenco kaj la gloro,
eterne.

Amen.

La Sakramento de la Sankta Bapto

Nia Sinjoro Kristo diras:

Iru en la tutan mondon, disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.

Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita.

La Sakramento de la Altaro aŭ la Sankta Vespermanĝo

Nia Sinjoro Jesuo Kristo en la nokto, en kiu Li estis perfidata, prenis la panon, dankis kaj dispecigis ĝin kaj donis al siaj disĉiploj kaj diris: prenu kaj manĝu, ĉi tio estas Mia korpo, kiu estas donata por vi. Ĉi tion faru por memorigo pri Mi.

Sammaniere Li prenis ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo, dankis kaj donis ĝin al ili kaj diris: Prenu kaj trinku vi ĉiuj el ĝi: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en Mia sango, kiu estas elverŝata por vi, por la pardonado de pekoj. Ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri Mi.

La Malgranda Katekismo de D-ro Martin Luther

La Unua Fundamenta Parto

La Dek Ordonoj

La Unua Ordono

**Mi estas la Eternulo, via Dio.
Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.**

Kio estas tio?

Ni timu, amu kaj konfidu Dion pli ol ĉiujn kreitaĵojn.

La Dua Ordono

**Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio;
ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun,
kiu malbonuzas Lian nomon.**

Kio estas tio?

**Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne malbenu, ĵuru, sorĉu,
mensogu nek trompu en Lia nomo,
sed en ĉiuj mizeroj Lin alvoku, preĝu,
laŭdu kaj danku.**

La Tria Ordono

Sanktigu la tagon sanktan.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne malestimu la predikon kaj Lian vorton,
sed tenu ĝin sankta, kaj volonte aŭdu kaj lernu ĝin.

La Kvara Ordono

Respektu vian patron kaj vian patrinon,
por ke estu al vi bone kaj longe daŭru via vivo sur
la tero.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne malestimu nek kolerigu niajn gepatrojn
kaj estrojn,
sed ilin honoru, servu, obeu, amu kaj estimu.

La Kvina Ordono

Ne mortigu.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni faru nek difekton, nek suferon al la korpo
de nia proksimulo,
sed helpu kaj prosperigu lin en ĉiuj korpaj bezonoj.

La Sesa Ordono

Ne adultu.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni vivu ĉaste kaj dece en vortoj kaj faroj,
kaj ke ĉiu amu kaj honoru sian geedzon.

La Sepa Ordono

Ne ŝtelu.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne forprenu la monon nek la havaĵojn de
nia proksimulo,
nek havigu al ni per falsaj varoj aŭ komercado,
sed ke ni helpu al li plibonigi kaj gardi sian havaĵojn
kaj nutraĵojn.

La Oka Ordono

Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne falseme mensogu, perfidu, kalumniu
nian proksimulon nek malbonigu lian famon,
sed ke ni senkulpigu lin, por bono parolu pri li kaj
interpretu ĉion favore al li.

La Naŭa Ordono

Ne deziru la domon de via proksimulo.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne ruze aspiru la domon nek la heredajon
de nia proksimulo
kaj ilin havigu al ni per preteksto de rajto,
sed ke ni lin helpu kaj servu lin por konservi ilin.

La Dekaj Ordonoj

Ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian
sklavon,
nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon,
nek ion, kio apartenas al li.

Kio estas tio?

Ni timu kaj amu Dion,
por ke ni ne maljingu nek fordungu nek delogu
de nia proksimulo liajn edzinon, servistaron aŭ
brutaron,
sed ke ni ilin admonu, ke ili restadu kaj faru siajn
devojn.

Kion Dio nun diras pri ĉiuj ĉi ordonoj?

Li diras jene:

Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa,
kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en
la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj,
sed al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj
ordonoj Mi faras favorkorajon ĝis en la milan
generacion.

Kio estas tio?

Dio minacas puni ĉiujn, kiuj malobeas ĉi tiujn
ordonojn;
tial ni timu Lian koleron
kaj ne agu kontraŭ tiuj ordonoj.
Sed Li promesas favoron kaj ĉion bonan al ĉiuj,
kiuj observas tiujn ordonojn;
tial ni ankaŭ amu kaj konfidu Lin
kaj ni volonte agu laŭ Liaj ordonoj.

La Dua Fundamenta Parto

La Kredo

La Unua Artikolo

Pri la kreado

Mi kredas je Dio la Patro, la Ĉiopova,
Kreinto de la ĉielo kaj de la tero.

Kio estas tio?

Mi kredas, ke Dio kreis min kaj ĉiujn kreitaĵojn
kaj donis al mi korpon kaj animon, okulojn, orelojn
kaj ĉiujn membrojn, racion kaj ĉiujn sensojn
kaj ankoraŭ konservas ilin,
krome vestojn kaj ŝuojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn,
domon kaj korton, edzinon kaj idojn, kampojn,
brutojn kaj ĉiujn havaĵojn,
ke Li abunde kaj ĉiutage provizas min per ĉiuj
bezonaĵoj kaj nutraĵoj por la korpo kaj vivo,
min ŝirmas kontraŭ ĉiu danĝero kaj protektas
kaj gardas kontraŭ ĉiu malbono.
Kaj ĉio ĉi el nura patra kaj Dia boneco
kaj favorkoreco,
sen mia merito kaj indeco.
Pro ĉio ĉi mi ŝuldas al Li dankon kaj laŭdon
kaj servon kaj obeon.

Tio estas certe vera.

La Dua Artikolo

Pri la savo

Mi kredas je Jesuo Kristo,
la sola Filo de Dio kaj nia Sinjoro,
kiu enkarniĝis per la Sankta Spirito,
naskiĝis el la virgulino Maria,
suferis sub Pontio Pilato,
krucumiĝis, mortis kaj entombiĝis,
malsupreniris en la inferon,
la trian tagon releviĝis el la mortintoj,
supreniris en la ĉielon,
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li revenos,
por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

Kio estas tio?

Mi kredas, ke Jesuo Kristo, vera Dio, naskita eterne
de la Patro,
kaj ankaŭ vera homo, naskita el la virgulino Maria,
estu mia Sinjoro,
kiu min, perditan kaj kondamniton homon, savis,
aĉetis, gajnis
el ĉiuj pekoj, el la morto kaj el la potenco de la
diablo,
ne per oro nek arĝento, sed per Sia sankta, valora
sango kaj per Sia senkulpa sufero kaj morto,
por ke mi estu Lia propraĵo kaj vivu en Lia regno
sub Li kaj ke mi servu Lin en eterna justeco,
senkulpeco kaj beateco,
same kiel Li releviĝis el la mortintoj, vivas kaj regas
eterne.

Tio estas certe vera.

La Tria Artikolo

Pri la sanktigo

Mi kredas je la Sankta Spirito,
unu sankta kristana Eklezio, la interkunuleco de la
sanktuloj,
pardonado de la pekoj,
releviĝo de la karno, kaj vivo eterna.

Amen.

Kio estas tio?

Mi kredas, ke mi ne el propra racio aŭ forto povas
kredi je Jesuo Kristo, mia Sinjoro, aŭ veni al Li,
sed la Sankta Spirito min alvokis per la Evangelio,
eklumigis per siaj donacoj, sanktigis kaj kon-
servis en la vera fido,
same kiel Li alvokas, kolektas, eklumigas, sanktigas
la tutan kristanaron sur la tero kaj konservas
ĝin ĉe Jesuo Kristo en la vera ununura kredo.
En tiu kristanaro Li pardonas al mi kaj al ĉiuj
kredantoj
ĉiujn pekojn ĉiutage kaj abunde
kaj en la Lasta Tago revivigos min kaj ĉiujn
mortintojn
kaj donacos al mi kaj al ĉiuj kredantoj en Kristo
vivan eternan.

Tio estas certe vera.

La Tria Fundamenta Parto

La Patronia

La Alparolo

Patro nia, kiu estas en la ĉielo.

Kio estas tio?

Dio volas logi nin per tio, ke ni kredu, ke Li estas
nia vera Patro kaj ni Liaj veraj infanoj,
por ke ni esperplene kaj plej konfideme petu al Li,
kiel karaj infanoj petas al sia kara patro.

La Unua Peto

Sanktigata estu Via nomo.

Kio estas tio?

La nomo de Dio estas ja sankta per si mem;
sed ni petas en ĉi tiu preĝo, ke ĝi estu sanktigata
ankaŭ ĉe ni.

Kiel okazas tio?

Kie la vorto de Dio estas instruata sincere kaj pure
kaj kie ni ankaŭ vivas laŭ ĝi sankte kiel la infanoj
de Dio.

Al tio helpu nin, kara Patro en la ĉielo!

Sed kiu instruas kaj vivas alie ol la vorto de Dio
instruas, tiu malsanktigas inter ni la nomon de
Dio.

Kontraŭ tio gardu nin, ĉiela Patro!

La Dua Peto

Venu Via regno.

Kio estas tio?

La regno de Dio venas ja sen nia preĝo per si mem, sed ni petas en ĉi tiu preĝo, ke ĝi venu ankaŭ al ni.

Kiel okazas tio?

Kiam la ĉiela Patro donas al ni Sian Sanktan Spiriton,
por ke ni al Lia sankta vorto per Lia graco kredu kaj pie vivu ĉi tie en la tempo kaj tie eterne.

La Tria Peto

Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero.

Kio estas tio?

La bona favora volo de Dio fariĝas ja ankaŭ sen nia preĝo, sed ni petas en ĉi tiu preĝo, ke ĝi fariĝu ankaŭ ĉe ni.

Kiel okazas tio?

Kiam Dio rompas kaj malhelpas ĉiun malbonan konsilon kaj volon,
kiuj ne volas permesi, ke ni sanktigu la nomon de Dio kaj ke venu Lia regno,
kiel tion volas la diablo, la mondo kaj nia karno, kaj kiam Li fortigas kaj konservas nin firme en Sia vorto kaj fido ĝis nia vivofino.
Tio estas Lia favora, bona volo.

La Kvara Peto

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.

Kio estas tio?

Dio donas ĉiutagan panon ja ankaŭ sen nia peto, al ĉiuj malbonaj homoj, sed ni petas en ĉi tiu preĝo, ke Li igu nin agnoski tion kaj dankeme akcepti nian ĉiutagan panon.

Kion signifas do ĉiutaga pano?

Ĉio, kio apartenas al la korpa nutraĵo kaj bezono, kiel manĝaĵo, trinkaĵo, vestoj, ŝuoj, domo, korto, kampoj, brutaro, mono, havaĵo, pia geedzo, piaj infanoj, pia servistaro, piaj kaj fidelaj estroj, bona registaro, bona vetero, paco, sano, disciplino, honoro, bonaj amikoj, fidelaj najbaroj kaj ĉio simila.

La Kvina Peto

Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

Kio estas tio?

Ni petas en ĉi tiu preĝo, ke la Patro en la ĉielo ne volu rigardi niajn pekojn kaj ke Li pro ili ne rifuzu niajn petojn;
ĉar ni ne estas indaj nek meritas ion, kion ni petas; sed Li volu doni al ni ĉion per graco,
ĉar ni multe pekas ĉiutage kaj meritas nenion krom puno.
Tial ni ankaŭ volas reciproke pardoni elkore kaj volonte bonfari al tiuj, kiuj pekas kontraŭ ni.

La Sesa Peto

Kaj ne konduku nin en tenton.

Kio estas tio?

Dio ja tentas nenlun, sed ni petas en ĉi tiu preĝo,
ke Dio nin gardu kaj konservu, por ke la diablo,
la mondo kaj nia karno nin trompu nek delogu
en malfidon, malesperon
kaj aliajn grandajn hontindaĵojn kaj malvirtojn,
kaj ke, eĉ se ni estas atakatoj de tiuj tentoj, ni tamen
fine akiru kaj konservu la venkon.

La Sepa Peto

Sed liberigu nin de la malbono.

Kio estas tio?

Ni petas en ĉi tiu preĝo kvazaŭ resume, ke la Patro
en la ĉielo nin liberigu de ĉiu malbono rilate al
korpo kaj animo, havaĵo kaj honoro,
kaj fine ke, kiam nia lasta horeto venos, Li donacu
beatan finon
kaj nin prenu per graco el ĉi tiu valo de ploroj al Si
en la ĉielon.

La Fino

Ĉar Viaĵ estas la regno kaj la potenco kaj la gloro
eterne. Amen.

Kion signifas Amen?

Ke mi estu certa,
ke tiaj petoj estas plaĉaj al la Patro en la ĉielo
kaj elaŭskultitaj.

Ĉar Li mem ordonis al ni tiel preĝi kaj promesis,
ke Li elaŭskultos nin.

Amen, amen, tio signifas: jes, jes, tiel fariĝu.

La Kvara Fundamenta Parto

La Sakramento de la Sankta Bapto

Unue

Kio estas la Bapto?

La Bapto estas ne nur simpla akvo,
sed ĝi estas la akvo, entenita en la Dia ordono
kaj ligita kun la Dia vorto.

Kiu estas tiu vorto de Dio?

Nia Sinjoro Jesuo Kristo diras laŭ Mateo en la lasta
ĉapitro:

Iru en la tutan mondon, disĉipligu ĉiujn naciojn,
baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la
Filo kaj de la Sankta Spirito.

Due

Kion donas aŭ por kio utilas la Bapto?

Ĝi donas pardonon de la pekoj, liberigas de la morto
kaj de la diablo
kaj donacas la eternan beatecon al ĉiuj, kiuj kredas
tion, kiel la vortoj kaj promesoj de Dio deklaras.

Kiuj estas tiuj vortoj kaj promesoj de Dio?

Nia Sinjoro Jesuo Kristo diras laŭ Marko en la lasta
ĉapitro:

Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita;
sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita.

Trie

Kiel akvo povas havi tiel grandajn efikojn?

Akvo ja ne faras tion,
sed la Dia vorto, kiu estas en kaj kun la akvo,

kaj la kredo, kiu fidas al tiu vorto en la akvo.
Ĉar sen la vorto de Dio la akvo estas simpla akvo
kaj neniŭ bapto;

sed kun la vorto de Dio ĝi estas bapto,
tio estas gracia akvo de vivo
kaj bano de nova naskiĝo en la Sankta Spirito,
kiel Paŭlo diras al Tito en la tria ĉapitro:
Dio savas nin per la lavado de renasko,
kaj per la renovigo de la Sankta Spirito,
kiun Li riĉe surverŝis sur nin per Jesuo Kristo,
nia Savanto;
por ke ni, justigite per Lia graco,
fariĝu heredantoj de eterna vivo,
laŭ la espero.

Tio estas certe vera.

K v a r e

Kion signifas do tiu akvobapto?

Ĝi signifas, ke la malnova Adamo en ni
estu dronigata per ĉiutaga pento kaj pentofaro,
kaj ke li mortu kune kun ĉiuj pekoj
kaj malbonaj emoj,
kaj ke denove ĉiutage eliru
kaj reviviĝu nova homo,
kiu vivu en justeco kaj pureco antaŭ Dio eterne.

Kie tio estas skribita?

La apostolo Paŭlo diras al la Romanoj
en la sesa ĉapitro:

Ni estas entombigitaj kun Kristo per la Bapto
en la morton,
por ke, kiel Kristo estas levita el la mortintoj
per la gloro de la Patro,
tiel same ni ankaŭ iradu en noveco de vivo.

La Kvina Fundamenta Parto

La Sakramento de la Altaro aŭ la Sankta Vespermanĝo

U n u e

Kio estas la Sakramento de la Altaro?

Ĝi estas la vera korpo kaj sango de nia Sinjoro
Jesuo Kristo,
sub pano kaj vino por ni kristanoj instalita
de Kristo mem,
por ke ni manĝu kaj trinku.

Kie tio estas skribita?

Jene skribas la sanktaj Evangeliistoj Mateo, Marko,
Luko kaj la Apostolo Paŭlo:

Nia Sinjoro Jesuo Kristo en la nokto,
en kiu Li estis perfidata,
Li prenis la panon, dankis kaj dispecigis ĝin
kaj donis al Siaj disĉiploj kaj diris:
prenu kaj manĝu: ĉi tio estas Mia korpo,
kiu estas donata por vi.

Ĉi tion faru por memorigo pri Mi.
Sammaniere Li prenis ankaŭ la kalikon post la
vespermanĝo, dankis kaj donis ĝin al ili kaj diris:
Prenu kaj trinku vi ĉiuj el ĝi:

Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en Mia sango,
kiu estas elverŝata por vi,
por la pardonado de pekoj.
Ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos,
por memorigo pri Mi.

Due

Por kio do utilas tiu manĝado kaj trinkado?

Tion montras al ni ĉi tiuj vortoj:

**„Por vi donata kaj elverŝata
por la pardonado de la pekoj,“**

nome, ke en la sakramento al ni estas donataj per
tiuj vortoj pardonado de la pekoj,
vivo kaj beateco;

ĉar kie estas pardonado de pekoj,
tie estas ankaŭ vivo kaj beateco.

Trie

*Kiel korpaj manĝado kaj trinkado povas havi tiel
grandajn efikojn?*

Manĝado kaj trinkado vere ne faras tion,
sed la vortoj tie skribitaj:

**„Por vi donata kaj elverŝata
por la pardonado de la pekoj.“**

Ĉi tiuj vortoj estas, krom la korpa manĝado
kaj trinkado, la ĉefaĵo en la sakramento.

Kaj kiu kredas al tiuj vortoj, tiu havas,
kion ili diras kaj kiel ili tekstas, nome:
pardonadon de la pekoj.

Kvare

Kiu ricevas do tiun sakramenton inde?

Fasti kaj korpe pretiĝi ja estas deca ekstera
disciplino,

sed tiu estas vere inda kaj plene preta,
kiu kredas tiujn vortojn:

**„Por vi donata kaj elverŝata
por la pardonado de la pekoj.“**

Sed kiu ne kredas tiujn vortojn aŭ dubas,
tiu estas malinda kaj nepreta;

ĉar la vorto: „Por vi“ postulas vere
kredantajn korojn.

Pri la Ofico de la Slosiloj kaj pri la Pekkonfeso

Kio estas la Ofico de la Slosiloj?

Ĝi estas la speciala potenco, kiun Kristo donis al Sia
Eklezio sur la tero,
por pardoni al la pentemaj pekintoj la pekojn,
sed por reteni al la nepentemaj la pekojn tiel longe,
kiel ili ne pentas.

Kie tio estas skribita?

Nia Sinjoro Jesuo Kristo diras al Petro
laŭ Mateo en la dekseca ĉapitro:

Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo;
kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo;
kaj kion ajn vi malligos sur la tero,
tio estos malligita en la ĉielo.

Same Li diras al Siaj disĉiploj
laŭ Johano en la dudeka ĉapitro:

Ricevu la Sanktan Spiriton!

Kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj;
kaj kies vi retenos, ili estas retenitaj.

Kio estas la konfeso?

La konfeso ampleksas du partojn en si:

unu, ke oni konfesu la pekojn,

la alia, ke oni ricevu

la absolvon aŭ pardonon de la konfesprenanto,

kiel de Dio mem, kaj ke oni nepre ne dubu pri tio,
sed firme kreu,

ke la pekoj estas pardonitaj

per tio antaŭ Dio en la ĉielo.

Rimarko: La parto pri la Ofico de la Slosiloj origine
ne troviĝas en la Malgranda Katekismo;
ĝi tamen devenas de Martin Luther.

Kiujn pekojn oni do devas konfesi?

Antaŭ Dio oni devas kulpigi sin pri ĉiuj pekoj,
eĉ pri tiuj, kiujn ni ne konscias,
kiel ni faras en la Patronia.
Sed antaŭ la konfesprenanto
ni konfesu nur tiujn pekojn,
kiujn ni scias kaj sentas en la koro.

Kiuj estas tiuj?

Jen rigardu vian staton laŭ la Dek Ordonoj,
ĉu vi estas patro, patrino, filo, filino,
aŭ en kiu profesio kaj servo vi staras,
ĉu vi estis malobeema, malfidela, maldiligenta,
kolerema, malĉasta, malpacema,
ĉu vi ofendis iun per vortoj aŭ agoj,
ĉu vi ŝtelis, preterlasis aŭ malutilis.

*Kiamaniere vi konfesas viajn pekojn
antaŭ la konfesprenanto?*

Jene vi diru al la konfesprenanto:

Mi petas, ke vi aŭdu mian pekconfeson
kaj alparolu al mi la absolvon pro Dio.
Poste konfesu vin kulpa antaŭ Dio pri ĉiuj pekoj
kaj eldiru antaŭ la konfesprenanto tion, kio kuŝas
sur vi kiel precipa peko kaj kulpo.
Vian pekconfeson vi povas fermi per la vortoj:
Tion ĉion mi bedaŭras. Mi petas gracon.
Mi volas pliboniĝi.

Kiel okazas la absolvo?

La konfesprenanto diras:

Dio korfavoru vin kaj fortigu vian kredon. Amen.
Ĉu vi ankaŭ kredas,
ke mia absolvo estas absolvo de Dio?

Respondo:

Jes, mi kredas.

Poste li diras:

Kiel vi kredas, tiel fariĝu al vi.

Kaj mi laŭ la ordono de nia Sinjoro Jesuo Kristo
pardonas al vi viajn pekojn en la nomo de la
Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.
Amen.

Iru en paco!

Sed kiuj havas grandan suferon de la konscienco
aŭ estas afliktataj aŭ turmentataj, tiujn la kon-
fesprenanto certe scios konsoli per pli multaj
vortoj el la Sankta Skribo kaj stimuli al fido.
Tio estu nur unu maniero de la pekconfeso.

La Komuna Pekconfeso

Ĉiopova Dio, favorkora Patro,
mi kompatinda, mizera, pekema homo konfesas al
vi ĉiujn miajn pekon kaj malbonagon, kiujn mi
faris per pensoj, vortoj kaj agoj,
per kiuj mi iam kolerigis vin kaj meritis vian
punon tempan kaj eternan.

Sed mi elkore bedaŭras ilin ĉiujn kaj pentegas pri ili,
kaj mi petas vin pro via senfunda favorkoreco
kaj pro la senkulpaj amaraj sufero
kaj morto de via Filo Jesuo Kristo,
ke vi estu gracoplena kaj favorkora al mi mizera
pekhava homo,
ke vi pardonu al mi ĉiujn miajn pekojn
kaj donacu por mia pliboniĝo la forton de via
Spirito.

Amen.

La Matena Beno

En la nomo de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito.
Amen.

Mi dankas vin, mia ĉiela Patro,
per Jesuo Kristo, via amata Filo,
ke vi ŝirmis min dum la pasinta nokto
kontraŭ ĉiu difekto kaj danĝero
kaj mi petas vin, ke vi ŝirmu min dum ĉi tiu
tago tiel same kontraŭ pekoj kaj ĉiu malbono,
por ke tuta mia agado kaj vivo plaĉu al vi.

Car mi konfidas min, mian korpon kaj animon
kaj ĉion en viajn manojn.

Via sankta anĝelo estu kun mi, por ke la malica
malamikoj ne havu potencon kontraŭ mi.

Amen.

La Vespera Beno

En la nomo de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito.
Amen.

Mi dankas vin, mia ĉiela Patro,
per Jesuo Kristo, via amata Filo,
ke vi ŝirmis min gracoplene dum ĉi tiu tago,
kaj mi petas vin, ke vi pardonu al mi ĉiujn
miajn pekojn, kie mi malbonagis,
kaj ŝirmu min gracoplene dum la venonta nokto.

Car mi konfidas min, mian korpon kaj animon
kaj ĉion en viajn manojn.

Via sankta anĝelo estu kun mi, por ke la malica
malamikoj ne havu potencon kontraŭ mi.

Amen.

La Aŭgsburga Konfesio

transdonita al la Imperiestra Moŝto en Aŭgsburg
en la jaro 1530.

Tiu konfesio estas verkita de Philipp Melanchthon,
komisiita de la Elektoro de Saksujo, de ses plujaj prin-
coj (inter ili la markgrafo Georg de Brandenburg-
Ansbach) kaj de la liberaj imperiaj urboj Nürnberg kaj
Reütlingen, kaj transdonita en germana kaj latina ling-
voj la 25-an de junio 1530 al la Regna Parlamento, kun-
veninta en Aŭgsburg. Dum la Regna Parlamento aliĝis
ankoraŭ aliaj urboj.

Tiu fundamenta konfesio de la evangelia-luterana
Eklezio estas represita en mallongigita kaj diversloke
singardeme glatigita formo laŭ eldonaĵo de la Evangelia
Luterana Eklezio en Bavarujo, aldonita al la nova
bavara kantaro.

La konfesio konsistas el 28 artikoloj, el kiuj la unuaj
21 temas pri la kredo kaj la doktrino de la Eklezio.

1. Pri Dio

Unue en konsento kun la koncilio Nicena unuanime
estas instruate, ke estas unu sola Dia estaĵo, kiu estas
nomata kaj vere estas Dio, kaj ke tamen tri personoj
estas en la sama unu Dia estaĵo, ĉiu sampotenca kaj
sameterna, Dio Patro, Dio Filo, Dio Sankta Spirito. Ĉiuj
tri estas unu Dia estaĵo, eterna, senpeca, senfina, de
nemezurebla potenco, saĝeco kaj boneco, kreinto kaj
konservanto de ĉiuj videblaj kaj nevideblaj objektoj.
Sed per la vorto persono oni komprenas nek pecon, nek
econ en la diaĵo, sed ion, kio ekzistas per si mem.

Tial estas malaprobataj ĉiuj herezaĵoj, kiuj estas kon-
traŭ tiu ĉi artikolo.

2. Pri la prapeko

Plue estas instruate ĉe ni, ke post la falo de Adam ĉiuj homoj, nature naskataj, estas koncipataj kaj naskataj en pekoj, tio signifas, ke ili ĉiuj estas ekdenaskiĝe plenaj je malbona volupto kaj emo kaj ne povas havi laŭ naturo veran plecon kaj veran kredon je Dio. Ankaŭ estas instruate, ke tiu ennaskita infekto kaj hereda peko vere estas peko kaj tial kondamnas sub la eternan Dian koleron ĉiujn, kiuj ne estas denove naskataj per la bapto kaj la Sankta Spirito.

Estas malaprobataj la Pelagianoj kaj aliaj, kiuj ne opinias la prapekon peko kaj tiel volas piigi la homan naturon per propraj fortoj je malhonoro de la sufero kaj merito de Kristo.

3. Pri la Filo de Dio

Same estas instruate, ke Dio la Filo homiĝis kaj naskiĝis el la pura virgulino Maria. La du naturoj en Li, la dia kaj la homa, estas unuigitaj nedisigeble en unu persono kaj estas unu Kristo. Li estas vera Dio kaj vera homo, vere naskiĝis, suferis, krucumiĝis, mortis kaj entombiĝis, por ke Li estu viktimo ne sole por la prapeko, sed ankaŭ por ĉiu alia peko, kaj repacigu la koleron de Dio. Tiu ĉi Kristo mal-supreniris en la inferon kaj vere releviĝis la trian tagon el la mortintoj. Li supreniris ĉielen kaj sidas dekstre de Dio, por ke Li suverenu eterne super ĉiuj kreitaĵoj kaj regu kaj sanktigu, purigu, fortigu kaj konsolu per la Sankta Spirito ĉiujn, kiuj kredas je Li, ankaŭ disdonu al ili vivon kaj ĉiajn donacojn kaj bonojn, kaj gardu kaj ŝirmu ilin kontraŭ la diablo kaj kontraŭ la peko. Same estas instruate, ke la sama Sinjoro Kristo en la fino de la mondo venos publike por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn ktp. laŭ la Apostola Konfesio.

4. Pri la justigo

Plue estas instruate, ke ni povas atingi pardonon de la peko kaj justecon antaŭ Dio ne per nia merito, ago kaj kompenso, sed ke ni ricevas pardonon de la peko kaj justigaĵo antaŭ Dio el graco pro Kristo per la fido, se ni kredas, ke Kristo suferis por ni kaj ke pro Li la peko estas pardonata kaj justeco kaj eterna vivo estas donacataj al ni. Ĉar tiun kredon Dio volas konsideri kiel justecon antaŭ Li kaj atribui al ni, kiel S-ta Paŭlo diras en la letero al la Romanoj en la 3-a kaj 4-a ĉap.

5. Pri la predik-ofico

Por ke ni atingu tiun kredon, Dio instalas la predik-oficon kaj donis la evangelion kaj la sakramentojn. Per tiuj iloj Li donas la Sanktan Spiriton, kiu naskas la kredon, kie kaj kiam Li volas, en tiuj, kiuj aŭdas la evangelion. Ĝi instruas, ke per la merito de Kristo, ne per nia merito ni havas favorkoran Dion, se ni tion kredas.

Estas malaprobataj la rebaptistoj kaj aliaj, kiuj instruas, ke ni atingas la Sanktan Spiriton sen la korpa vorto de la evangelio per propraj preparo, pensoj kaj agoj.

6. Pri la nova obeo

Ankaŭ estas instruate, ke tiu kredo devas kreskigi bonajn fruktojn kaj agojn kaj ke oni devas fari ĉiujn bonajn agojn, kiujn Dio ordonis; sed ĉio ĉi pro Dio, tamen ne, kvazaŭ oni povus fidi tiujn agojn kaj meriti per ili gracon antaŭ Dio. Ĉar ni ricevas pardonon de la peko kaj justecon per la fido je Kristo, kiel Kristo mem diras: „Kiam vi faris ĉion tion, diru: Ni estas senutilaj servistoj.“ Luk. 17, 10. Tiel ankaŭ la patroj instruas.

7. Pri la Eklezio

Estas ankaŭ instruate, ke ĉiutempe estos kaj restos sankta kristana Eklezio. Ĝi estas la kunularo de ĉiuj kredantoj, inter kiuj la evangelio estas pure predikata kaj la sanktaj sakramentoj estas donataj laŭ la evangelio.

Sed por la vera unueco de la Eklezio sufiĉas, ke la evangelio estas predikata unuanime laŭ la ĝusta kompreno kaj la sakramentoj estas donataj laŭ la Dia vorto. Ne estas necese por la vera unueco de la Eklezio, ke ĉie la samaj ceremonioj, instalitaj de la homoj, estu observataj.

8. Kio la Eklezio estas

La kristana Eklezio estas verdire nenio alia ol la kunularo de ĉiuj kredantoj kaj sanktuloj. Sed ĉar en tiu ĉi vivo multaj falsaj kristanoj kaj hipokrituloj ekzistas kaj ankaŭ inter la piuloj restas publikaj pekuloj, la sakramentoj tamen estas fortaj (t. e. efikaj), ankaŭ kiam la pastroj, per kiuj ili estas donataj, ne estas piaj.

Tial estas malaprobataj la Donatistoj kaj ĉiuj aliaj, kiuj alie opinias.

9. Pri la Bapto

Pri la Bapto estas instruate, ke ĝi estas necesa kaj ke per ĝi la graco de Dio estas ofertata. Oni baptu ankaŭ jam la infanojn, ĉar ili estas per la bapto transdonataj kaj plaĉaj al Dio.

Estas malaprobataj la rebaptistoj, kiuj instruas, ke la infanbapto ne estas ĝusta.

10. Pri la Sankta Vespermanĝo

Pri la Vespermanĝo de la Sinjoro estas instruate, ke la vera korpo kaj la vera sango de Kristo vere estas ĉeestantaj sub la formo de la pano kaj de la vino en la Vespermanĝo kaj tie estas disdonataj kaj prenataj.

La kontraŭinstruo estas malaprobata.

11. Pri la Pekkonfeso

Pri la pekkonfeso estas instruate, ke oni retenu kaj ne faligu la privatan absolvon (t. e. la absolvo de la peko al la unuopulo), kvankam en la pekkonfeso ne estas necese, nomi ĉiujn malbonagojn kaj pekojn, ĉar tio ja tute ne estas ebla. Ĉar „Kiu scias siajn erarojn?“ (Ps. 19, 12.)

12. Pri la Pento

Pri la pentto estas instruate, ke tiuj, kiuj pekis post la bapto, ĉiutempe, se ili venas al pentto, povas atingi pardonon de la pekoj kaj ke la absolvo ne devas esti rifuzata al ili per la Eklezio. Nu, vera kaj ĝusta pentto estas verdire nenio alia, ol ke oni havu doloron kaj ĉagrenon kaj teruron pri la peko kaj ke krom tio tamen oni kredis je la evangelio kaj je la absolvo, ke la peko estas pardonita kaj per Kristo graco estas akirita. Tiu kredo ree konsolas la koron kaj donas al ĝi pacon. La penton devas sekvi ankaŭ la pliboniĝo, por ke oni evitu la pekojn. Ĉar tio devas esti la fruktoj de la pentto, pri kiuj Johano diras: „Donu fruktojn taŭgajn de pentto!“ (Mat. 3, 8.)

Tiurilate ĉiuj estas malaprobataj, kiuj instruas, ke tiuj, kiuj estiĝis piaj unufoje, ne povas denove fali. Same la Novacianoj estas malaprobataj, kiuj rifuzis la absolvon al tiuj, kiuj estis pekintaj post la bapto. Ankaŭ tiuj estas malaprobataj, kiuj ne instruas, ke oni ricevas per kredo pardonon de la peko, sed instruas, ke oni ricevas ĝin per nia kompensado.

13. Pri la uzo de la Sakramentoj

Pri la uzo de la sakramentoj estas instruate, ke la sakramentoj estas instalitaj ne sole, por ke ili estu signoj, per kiuj oni povas ekkoni la kristanojn ekstere, sed ankaŭ por tio, ke ili estu signoj kaj atestoj de la Dia volo al ni, por vekti kaj fortigi nian kredon per ili. Tial ili postulas ankaŭ kredon kaj tiam estas uzataj ĝuste, se oni ilin ricevas en la kredo kaj per ili fortigas la kredon.

14. Pri la eklezia regado

Pri la eklezia regado estas instruate, ke neniu en la Eklezio publike instruu aŭ prediku aŭ donu la sakramentojn, ne estante por tio laŭorde vokita.

15. Pri ekleziaj ordoj

Pri ekleziaj ordoj, kiuj estas faritaj de homoj, oni instruas observi tiujn, kiuj povas esti observataj sen peko kaj kiuj servas al la paco kaj al bona ordo en la Eklezio kiel iuj ripoz-tagoj, festoj kaj similaj. Tamen oni ne devas ĝeni per tio la konsciencojn, kvazaŭ tiaj aferoj estus necesaj por la beateco. Monaĥejaj votoj kaj aliaj tradicioj, faritaj de homoj, per kiuj oni opinias meriti gracon kaj kompensi por la peko, estas kontraŭ la evangelio kaj la kredo je Kristo kaj ne taŭgas.

16. Pri la polico kaj pri la monda regado

(En tiu artikolo per „polico“ ĉio ĉi estas difinita, kion hodiaŭ ni envicigas en la amplekse komprenitan politikan kaj publikan vivon. La vorto polico estas derivata de la fremdvorto: politeia.)

Pri polico kaj monda regado estas instruate, ke ĉiu aŭtoritato en la mondo kaj ĉiuj ordigitaj registaroj kaj leĝoj estas bonaj ordoj, kreitaj kaj instalitaj de Dio. Tial kristanoj povas esti sen peko en aŭtoritato, en princa kaj juĝista oficoj, paroli juĝon kaj decidon laŭ kutimaj leĝoj, puni malbonulojn per la glavo, soldati, ĝuste militi, kontrakti laŭ la leĝo, aĉeti kaj vendi, fari surmetitajn jurojn, havi proprajn, geedzadi kaj tiel plu.

Estas malaprobataj la rebaptistoj, kiuj instruas, ke nenio el la supre diritaj aferoj estas kristana. Ankaŭ tiuj estas malaprobataj, kiuj instruas, ke kristana perfekteco konsistas en tio, forlasi domon kaj bienon kaj edzinon kaj infanon kaj senigi sin de la antaŭmenciitaj pecoj (t. e. oficoj kaj agadoj). La ĝusta perfekteco sole estas ĝusta diotimo kaj ĝusta kredo je Dio. Ĉar la evangelio ne faligas la mondan regadon, la policon kaj la edzecon, sed volas, ke oni rigardu ĉion ĉi kiel ordon de Dio kaj ke oni pruvu en tiaj situacioj, ĉiu laŭ sia vokiteco, kristanan amon kaj ĝustajn bonajn farojn. Tial la kristanoj ŝuldas submetiĝi al la aŭtoritatoj kaj obei ties ordonojn kaj leĝojn en ĉio, kio povas fariĝi sen peko. Sed se la ordono de la estraro ne povas plu fariĝi sen peko, oni devas obei Dion prefere ol homojn. (Agoj 5, 29.)

17. Pri la reveno de Kristo por la juĝo

Ankaŭ estas instruate, ke nia Sinjoro Jesuo Kristo venos en la Lasta Tago por juĝi kaj ke Li revivigos ĉiujn mortintojn, donos al la kredintoj kaj elektitoj eternan vivon kaj eternan ĝojon, sed kondamnos la malpiulojn kaj la diablojn en la inferon kaj en la eternan punon.

Tial estas malaprobataj la rebaptistoj, kiuj instruas, ke la diabloj kaj la kondamnitaj homoj ne havos eternajn torturon kaj turmenton. Same estas malapropa-

taj iuj judaj instruoj, kiuj ankaŭ nun denove montriĝas, ke antaŭ la releviĝo de la mortintoj nur sanktuloj kaj piuloj havos mondan regnon (sur la tero) kaj ekstermos ĉiujn malpiulojn.

18. Pri la libera volo

Pri la libera volo estas instruate, ke la homo havas iamaniere liberan volon por publike vivi honeste kaj elekti inter tiuj objektoj, kiujn la racio komprenas. Sed sen graco, helpo kaj efiko de la Sankta Spirito la homo ne kapablas ekplaĉi al Dio, elkore timi Dion nek kredi nek jeti el la koro la ennaskitan malbonan volupton. Tio okazas nur per la Sankta Spirito, kiu estas donata per la vorto de Dio.

19. Pri la kaŭzo de la peko

Pri la kaŭzo de la peko ĉe ni estas instruate: Kvakam Dio, la Plejpotenculo, kreis kaj konservas la tutan naturon, tamen la falsa volo naskas la pekon en ĉiuj, kiuj estas malbonaj kaj malestimas Dion. Estas la volo de la diablo kaj de ĉiuj malpiuloj, kiu sin turnis de Dio al la malboneco, tuj kiam Dio forprenis la manon.

20. Pri la kredo kaj la bonaj agoj

Malĝuste oni kalumnias la niajn, ke ili malpermesas bonajn agojn. Ĉar iliaj skribaĵoj pravas, ke bone kaj ĝuste ili instruis pri la agoj. Pri la ĝustaj agoj oni ja instruis malmulte antaŭ tiu tempo, sed instigis al petolaj, nenecesaj agoj, kiaj estas trapreĝado de la rozario, servo al la sanktuloj, monaĥiĝo, pilgrimadoj, fastadoj, festtagoj, kunfrataroj kaj similaj. Sed la instruo pri la kredo, kiu do estas la ĉefaĵo en la kristana eklezio, ne estis plu impulsata longan tempon, sed sole la dogmo pri la agoj estis predikata en ĉiuj lokoj.

Ĉar tio estis tiel, per la niaj fariĝis jena instruo: Niaj agoj ne povas repacigi nin kun Dio kaj akiri por ni gracon. Tio fariĝas sole per la kredo, ke la pekoj estas pardonataj al ni pro Kristo; ĉar Li sola estas la peranto, kiu povas repacigi la Patron. Sed kiu kredas, repacigi Dion per siaj agoj, tiu malestimas Kriston kaj serĉas sian propran vojon al Dio, kontraŭ la evangelio. Ĉar la konscienco ne povas veni al ripozo kaj paco per agoj, sed sole per la kredo, ke pro Kristo ekzistas favorkora Dio.

Plue estas instruate, ke bonaj agoj fariĝu kaj devas okazi, sed ne tiel, ke oni konfidas ilin, kvazaŭ oni povus meriti per ili gracon, sed oni devas fari la bonajn agojn pro Dio kaj je laŭdo al Dio. La kredo akceptas ĉiutempe sole gracon kaj pardonon de la peko. Tial la dogmo pri la kredo estas laŭdenda, ke ĝi instruas fari bonajn agojn kaj ke ĝi ofertas helpon, kiel oni povas veni al bonaj agoj. Ĉar sen la kredo kaj sen Kristo la homa naturo estas multe tro malforta, por fari bonajn agojn, alvoki Dion, pacienci en sufero, ami la proksimulon, diligente plenumi ordonitajn oficojn, obei, eviti malbonan volupton ktp. Tiuj altaj kaj ĝustaj agoj ne povas okazi sen la helpo de Kristo, kiel Li mem diras Joh. 15: „Sen mi vi nenion povas fari.“

21. Pri la servo al la sanktuloj

Pri la servo al la sanktuloj estas instruate de la niaj, ke oni memoru pri la sanktuloj, por ke ni fortigu nian kredon, vidante, kiel ili ricevis gracon kaj kiel per la kredo helpo estis donita al ili. Tiam ankaŭ ĉiu povas preni ekzemplon de iliaj bonaj agoj.

Sed per la Skribo oni ne povas pruvi, ke oni alvoku la sanktulojn aŭ serĉu helpon ĉe ili. Ĉar unu sola repaciganto kaj peranto estas metita inter Dio kaj la homoj, Jesuo Kristo (1. Tim. 2), kiu estas la unika Savanto, la

unika ĉefpastro, trono de graco kaj porpetanto antaŭ Dio. Kaj Li sola promesis, ke Li volas elaŭskulti nian preĝon. Tio estas ankaŭ la plej alta Di-servo laŭ la Skribo, ke oni elkore serĉu kaj alvoku Jesuon Kriston en ĉiuj mizeroj kaj zorgoj. „Se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan.“ (1. Joh. 2, 1.)

(Rim. La artikoloj 1—21 temas pri la kredo kaj pri la doktrino de la Eklezio. En la dua parto de la Aŭgsburga Konfeso oni pritraktas la misuzojn en la eklezia vivo. En la daŭrigo la enhavo de la ampleksaj artikoloj 22—28 estas laŭbezzone mallonge resumita.)

22. Pri la duobla formo de la altarsakramento

Al la laikoj ĉe ni la sakramento estas donata en duobla formo de pano kaj de vino. Ĉar tio estas klara ordono de Kristo: „Vi ĉiuj trinku el ĝi.“ (Mat. 26, 27.) Kristo ordonas per klaraj vortoj pri la kaliko, ke ili ĉiuj trinku el ĝi. Kaj por ke neniu povu kontraŭstari tiujn vortojn, kvazaŭ la kaliko apartenu sole al la sacerdotoj, Paŭlo montras 1. Kor. 11, ke la tuta komunumo de la Korintanoj ricevis panon kaj vinon. Tiu kutimo restis ankaŭ longan tempon en la Eklezio, kiel oni povas pruvi per la skriboj de la patroj. Tial oni ne devigu la kristanaron, kiu deziras la Sanktan Vespermanĝon laŭ la instalo de Kristo, agi kontraŭ la ordono de Kristo.

23. Pri la edzeco de la pastroj

Dio instalas la edzecon (1. Mos. 1). Resti senedza estas speciala donaco, kiun ne ĉiu homo ricevas de Dio (Mat. 19, 12). Ne estas ĝuste, se la homo el propra volo per votoj volas resti senedza, escepte se Dio lin destinas al senedzeco. Kie tamen propravole senedzeco estis votita, multa mizero kaj malĉasteco ekestis. La vorto

kaj la ordono de Dio povas esti malhelpataj per neniu homa leĝo nek ordono. Tial el tiu kaj el aliaj kaŭzoj la sacerdotoj kaj pastroj edziĝis. En la kristana Eklezio ekde la komenco la pastroj povis esti edziĝintaj. Tiel diras Paŭlo: „Episkopo devas esti neriproĉebla, edzo de unu edzino.“ (1. Tim. 3, 2.) Sed ne pli frue ol antaŭ kvarcent jaroj (en la jaro 1074) la sacerdotoj estis perforte forigitaj de la edzeco.

24. Pri la meso

(Pri la diservo)

La meso ne estas forigita de la evangelianoj, sed estas observata kun pli granda devoteco ol ĉe la kontraŭuloj. La diservaj formoj ne estas rimarkinde ŝanĝitaj. Sed oni forigis la eraron, ke la meso estas ofero por vivantoj kaj mortintoj, per kiu oni povas forpreni pekon kaj repacigi Dion. La Skribo montras en multaj lokoj, ke ekzistas neniu alia viktimo por la prapeko kaj ĉiuj aliaj pekoj ol sole la morto de Kristo. (Hebr. 9, 28; 10, 10; 10, 14.)

La homoj estas instruataj pri la instalo kaj ĝusta uzo de la Vespermanĝo.

25. Pri la pekkonfeso

Ĉe ni la altarsakramento ne pli frue estas donata, ol post kiam la homoj antaŭe pekkonfesis kaj estis absolutitaj. Per tio estas montrata al ili, kiel konsola estas la vorto de la absolvo, en kiu ni aŭdas pli ol la vorton de homo, nome Dion mem, kiu pardonas la pekon. De neniu povas esti postulate, detale nomi ĉiujn pekojn, ĉar tio estas neebla pro la difekto de la homa naturo. La psalmisto diras (19, 12): „Kiu scias siajn erarojn?“ Kaj Jeremia diras (17, 9): „Malica estas ĉies koro, kaj nefidinda; kiu povas ĝin ekkoni?..“

26. Pri la distingado de la manĝaĵoj (kaj pri ekleziaj ordoj)

Estas kontraŭ la Skriboj, se oni rigardas fastajn ordonojn, ordenajn regulojn kaj similajn homajn regulojn kiel necesajn por la savo kaj deklaris ilian neobservadon kiel pekon kaj se inverse oni degradis la realajn bonajn agojn, la laboron de la familia patro, la naskadon kaj edukadon de la infanoj fare de la patrino aŭ la regadon de lando fare de la estraro kiel nur „mondajn“ kaj neperfektajn agojn kontraŭe al tiuj laŭŝajne sole sanktaj agoj. La artikolo plue montras, kion la evangelia-luterana Eklezio komprenas sub korpa ekzercado, disciplino kaj asketa sinteno: Suferi la sanktan krucon, fasti kaj observi aliajn ekzercojn, por ke ni ne donu kaŭzon por peko. Per tio ni tenas la korpon taŭga, ke ĝi ne malhelpu fari, kio estas ordonita al ĉiu en sia vokiteco. Do ne la fastado mem estas malaprobata, sed nur ĝia misuzo kiel ago meritplena kaj fiksita por difinitaj tempoj.

27. Pri monaĥejaĵaj votoj

Estis erare, se oni egaligis la monaĥejaĵajn votojn al la bapto, se oni do instruis, ke oni povus meriti per la monaĥeja vivo pardonon de la peko kaj justigon antaŭ Dio. Kiu volas esti justigata antaŭ Dio per votoj, foriĝis de Kristo, rabas de Kristo, kiu sola justigas, Lian gloron kaj donas tiun gloron al siaj votoj. La ordo de la monaĥoj estas neniel ordo de la perfekteco. La kristana perfekteco konsistas el tio, ke oni serioze timas Dion kaj tamen pro Kristo ekkaptas koran konfidon al Dio, ke en ĉiu aflikto oni esperas Lian helpon, faras diligente bonajn agojn kaj plenumas sian profesion.

28. Pri la potenco de la episkopoj

Nia Eklezio senkondiĉe persistas en la distingado de la du regadoj, kiujn Dio donis, de la eklezia kaj de la monda regado. La eklezia regado konsistas en la ordono kaj en la potenco, prediki la evangelion, pardoni kaj reteni pekojn, disdoni kaj administri la sakramentojn, malaprobi la doktrinon, kiu estas kontraŭ la evangelio, eligi el la kristana komunumo la malpiulojn, kies malpia agado estas evidenta. Al ĝi estas donita neniu homa potenco. Ĝi efikas sole per la vorto. La monda regado ne ŝirmas la animojn, sed korpon kaj havaĵojn kontraŭ ekstera perforto per la glavo kaj surteraj punoj.

Ambaŭ regadoj devenas de Dio. Ili ne devas esti reciproke intermiksataj (Luk. 12, 14; Joh. 18, 36; 2. Kor. 10, 4). La eklezia potenco ne etendu la manojn al la ofico de la monda potenco; la monda potenco ne etendu la manojn al la ofico de la eklezia potenco.

Kie la eklezia regado instruas aŭ faras ion kontraŭ la evangelio, ni havas la ordonon, ke ni ne obeu ĝin (Mat. 7, 15; Gal. 1, 8; 2. Kor. 13, 8). Kie ĝi enkondukas ekleziajn ordojn kaj ceremoniojn, ili ne devas esti kontraŭ la evangelio. Por ke en la Eklezio ne estu malordo kaj sovaĝa konduto, oni submetiĝu al ili pro la amo kaj pro la paco.